

**61-a Kongreso de IKUE  
ALIĜILO KAJ MENDILO**

Sendu rete al: marija@catholic.org , fakse: +385 1 37 45 052 aŭ per ordinara poŝto al la adreso: Marija Beloŝević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio.

*Ĉiu aliĝinto uzu apartan aliĝilon. La aliĝilon/mendilon bv. plenigi preslitere.*

PERSONA(J) NOMO(J)	FAMILIA NOMO
ADRESO (strato, domnumero)	POŝTKODO, URBO, ŜTATO
NASKIĜDATO	TELEFONO
RETADRESO	FAKSO
Mi estas vegetarano: JES NE	Mi estas handikapito: JES NE
Mi planas alveni (dato, transportilo)	Mi planas forveturi (dato, transportilo)
Mi mendas hotelajn servojn (plenan pensionon) en (metu <input checked="" type="checkbox"/> )	Mi estas parta partoprenanto kaj mi mendas servojn de la dato _____ ĝis la dato _____ en (metu <input checked="" type="checkbox"/> )
1-lita ĉambro ~	1-lita ĉambro ~
2-lita ĉambro ~	2-lita ĉambro ~
3-4-lita ĉambro ~	3-4-lita ĉambro ~
Mi deziras dividi ĉambron (loĝi) kun	
Mi havas apartan dieton	

***Mi pagas:***

- Kongreskotizon = \_\_\_\_\_ EUR
- Hotelajn servojn = \_\_\_\_\_ EUR
- Libervola kontribuo al la kongresa kaso = \_\_\_\_\_ EUR
- SUME = \_\_\_\_\_ EUR

Antaŭpagon de \_\_\_\_\_ EUR mi ĝiris al la:

~ **Banka konto en Rimini**

~ **UEA konto de IKUE**

Dato: \_\_\_\_\_ Subskribo: \_\_\_\_\_

**61-A KONGRESO**

**DE INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA  
30-a de aŭgusto – 6-a de septembro en Rimini, Italio**

Kongresa temo: Verbum Domini - La Parolo de Dio  
*"Nia politiko: Paroli kaj preĝi" (Paŭlo la 6-a)*

Inter multaj taskoj de la eklezia komunumo en la nunepoka mondo estas evangelizado kaj ekumenismo. Ili baziĝas sur la Parolo de Dio kaj samtempe ili ricevas motivon kaj forton el ĝi. La misiista agado de la Eklezio por sia evangelizado ĉerpas inspiron kaj celon el la mizerikorda revelacio de la Sinjoro. La ekumena dialogo devas esti animata de konstanta orientado de la origina Parolo, kiun Dio liveris al sia Eklezio, por ke oni legu, komprenu kaj travivu ĝin en ĝia kunuleco.

La Parolo estas trezoro, kiun la Eklezio posedas ekde la komenco kaj kiun ĝi devas daŭre remalkovri. Al tio la Papo invitas la tutan Eklezion per konstantaj instigoj, kaj aparte per la arigo de la venontoktobra Sinodo de la Episkopoj, dediĉota al la temo "La Parolo de Dio en la Vivo kaj Misio de la Eklezio" (en Vatikano, de la 5-a ĝis la 26-a de oktobro 2008).

Ni, la katolikaj esperantistoj, devas senti pli forte la vokojn al la evangelizado kaj ekumenismo, ĉar ili estas kernaj motivoj de nia movado: paroli kaj dialogi, preĝi kaj mediti. Dum la kongreso ni klopodos, deirante el ĉiutaga renkonto kun Kristo en la Eŭkaristio (la Parolo de Dio estas unu el la du bankedoj de la Meso), pliprofundigi nian agadon, relanĉi nian ateston, sed ĉefe remalkovri la gravecon de la Parolo de Dio en nia vivo, ankaŭ en nia movada vivo. Kaj ĉar unu el la taskoj de la evangelizado estas konigi la Parolon de Dio, ni klopodos kompreni, kiel la nuna E-traduko de la Biblio spegulas fidele la Dian mesaĝon, aŭ ĉu necesas aktualigi tiun tradukon.

Ni deziras proponi nian ateston, kiu laŭ mondumaj vortoj nomiĝas "nia politiko", kiu estas resumebla per la vortoj de la Papo Paŭlo la 6-a (al kiu la kongreso omaĝos en la 30-a datreveno de lia naskiĝo al la ĉielo): paroli kaj preĝi. Kiu esperantista asocio estus tiu, kiu ne parolas? Kiu katolika asocio estus tiu, kiu ne preĝas?

Kaj kiel proponi al la Eklezio kaj al la mondo nian mesaĝon? Ĉar fakte, kiel parto de la universala Eklezio, ni la katolikaj esperantistoj deziras doni nian humilan kontribuon al la granda meditado, kiu koncernas ĉiujn sektorojn prepare al la granda eklezia evento de la oktobro, sed ĉefe akcepti la inviton de la Papo Benedikto la 16-a: levi la rigardon, kiu tro atentis la materiajn aferojn, por malkovri tiujn spiritajn, por ke la Parolo de Dio fariĝu nia nutraĵo kaj ni povu koni kaj fari, kiel Jesuo, ne nian volon, sed tiun de la Patro (kp Joh 4,34).

La kongresa urbo estas jam sufiĉe bone konata inter esperantistoj. Ni nur menciui, ke ĉi-jare oni celebras 100-jariĝon de Esperanto en Rimini.

La kongresa programo, kiel kutime, disvolviĝos ĉirkaŭ la preĝejo de s-taj Johano kaj Paŭlo en ĉemara urbo-parto San Giuliano Mare.

La kongresan pilgrimadon ni direktos al Osimo, loko, kie la 18-an de septembro 1663 mortis s-ta Jozefo el Kupertino, konata mistikulo. Krome li ankaŭ estas patrono de pilotoj, flugistoj, flugpasaĝeroj, kosmonaŭtoj, paraŝutistoj kaj studentoj.

**Aktualaj informoj: [www.ikue.org/kong2008](http://www.ikue.org/kong2008)**

## KOTIZOJ

**Tarifo A:** Iamaj socialismaj landoj de Eŭropo (escepte de tiuj, en kiuj hodiaŭ cirkulas papera Eŭro), ĉiuj landoj de Azio (escepte de Arabio, Israelo, Japanio, Malajzio, Sudkorea Respubliko), Afriko (escepte de Sudafriko), Latina Ameriko, Oceanio (escepte de Aŭstralio, transmaraj teritorioj de Francio).

**Tarifo B:** Ĉiuj mondaj landoj ne inkluzivigitaj sub A.

### KONGRESA ALIĜ-KOTIZO (nerepagebla kaj netransdonebla!)

	A	B
Ĝis la 31-a de julio	15 EUR	50 EUR
Depost la 1-a de aŭgusto	40 EUR	70 EUR

Infanoj ĝis 9 jaroj aliĝas senpage

### LOĜ-KOTIZO (inkluzive de manĝoj, por persono, por la tuta kongresa periodo)

	A	B
2-lita ĉambro	150 EUR	230 EUR
1-lita ĉambro (limigita nombro)	230 EUR	310 EUR
3-4-lita ĉambro	125 EUR	200 EUR

### Partaj partoprenantoj - kosto por unu plena pensio

2-lita ĉambro	28 EUR	40 EUR
1-lita ĉambro (limigita nombro)	39 EUR	50 EUR

## ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ - bv. atente legi:

- Supraj prezoj inkluzivas: plenan pensionon en du- kaj tri-stelaj hoteloj je pieda distanco de la preĝejo, kongresejo, maro, kaj same ne tro for de la centro de la urbo. La prezo inkluzivas impostojn, servojn kaj aldonvaloran imposton.
- La trinkaĵoj konsistas el ½ litro da akvo kaj ¼ litro da vino por persono ĉe ĉiu manĝo.
- **SE VI MENDAS HOTELON, vi devas antaŭpagi 100 EUR antaŭ la 30-a de junio. La antaŭpago por la hotela restado estas deviga. Kiu aliĝos depost la 30-a de junio, tiu devas pagi la aliĝkotizon kaj la tutan pagon de la hotela mendo, sed nepre post certigo de la organizantoj, ke estas ankoraŭ liberaj ĉambroj, ĉar post fino de junio oni ne plu garantias plenumon de la hotelmendoj. Kiu sendis nur la antaŭpagon, tiu devas ĝis la 10-a de aŭgusto finpigi la menditajn hotelajn servojn, por eviti nuligon de la mendo.**

### Kaze de malmendo, estas aplikataj jenaj forprenoj de la enpago:

- -25% de la pagita sumo, se la malmendo okazas ĝis la 30-a tago antaŭ la komenco-dato de la menditaj servoj;
- -50% de la pagita sumo, se la malmendo okazas ĝis la 14- tago antaŭ la komenco-dato de la menditaj servoj;
- -75% de la pagita sumo, se la malmendo okazas ĝis la 3-a tago antaŭ la komenco-dato de la menditaj servoj;
- neniu repago post la indikita datlimo.
- Kaze de interrompo de restado, neniu repago estos farata.

## Ĉiu partoprenanto bonvolu plenigi kaj sendi apartan aliĝilon.

- Post la 1-a de aŭgusto oni ne garantias plenumon de la hotelaj mendoj.
- La aliĝo validas post la ricevo kaj de la aliĝilo kaj de la aliĝkotizo. Ĉiuj aliĝintoj ricevos la konfirmon de la aliĝilo kaj informojn, kiel atingi la kongresejon, respektive la hotelon.

## PAGMANIERO

**BANKO:** Banca Popolare VALCONCA-Rimini/Italio.  
Konto je nomo: CER-ES-Rimini - Duilio Magnani  
IBAN: IT19 M057 9224 204C C078 0001 079  
SWIFT: BPVMIT2R

**Pere de UEA:** konto "ikue-v" de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista - Romo, Italio.  
Oni ne FORGESU skribi la kialon de la pago.

**Ĉiujn demandojn pri la kongresa programo, pagmaniro aŭ simile bv. adresi al la jenaj adresoj: al ordinara poŝta adreso: Marija Beloŝević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio; ret-adreso: marija@catholic.org; fakso: +385 1 37 45 052.**

## PROVIZORA KONGRESA PROGRAMO

Sabato, 30-a de aŭgusto: Akcepto kaj loĝigo; S. Meso, rozario.

Dimanĉo, 31-a de aŭgusto: Inaŭgura S. Meso, inaŭguro de la kongreso, enkonduka prelego, vespera programo.

Lundo, 1-a de septembro: S. Meso, prelegoj teme ligitaj al la kongresa temo, Anĝelusio, studgrupoj, rozario, vespera programo.

Mardo, 2-a de septembro: S. Meso, Ĝenerala Kunveno de IKUE, Anĝelusio, prezento de la ekskurso, rozario.

Merkredo, 3-a de septembro: Tuttaga pilgrimo al Osimo: S. Meso en sanktejo de st-a Jozefo el Kupertino (1603-1663) kaj Rozario en Maria-sanktejo en Campocavallo di Osimo (tagmanĝo el la saketo). GRAVE: pilgrimo estas parto de la oficiala programo, sekve ĝin rajtas partopreni ĉiuj aliĝintoj al la kongreso.

Ĵaŭdo, 4-a de septembro: S. Meso, vizito al la katedralo de Rimini, prelegoj teme ligitaj al 150-jara jubileo de aperoj de V. Maria en Lurdo, rozario, vespera programo.

Vendredo, 5-a de septembro: S. Meso, prelegoj ligitaj al la agado de IKUE, Anĝelusio, libera posttagmezo (ebleco ekskursi al \*Eta Italio+ proprakoste), internacia vespero, fermo de la kongreso.

Sabato, 6-a de septembro: Danka S. Meso, tagmanĝo, adiaŭo.

## GRAVE

**Personoj, kiuj bezonas vizon por eniri Italion, kiel eble plej baldaŭ informiĝu ĉe la plej proksima itala ambasadejo pri la kondiĉoj por ricevi la vizon.**

**La plenigitan aliĝilon kun la kopio de la pasporto ĉe la paĝo(j), kie troviĝas la foto kaj datumoj, sendu al la adreso: Don Duilio Magnani, Viale Zavagli 73, IT-47900 Rimini, Italio.**